

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 52-54 (311-313)

Aprilo-Junio 1942

Redator responsavel:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

ESPERANTO ĈE LA BRAZILA STATISTIKO

El la Raporto de 1941 prezentita al Lia Moŝto D-ro Getúlio Vargas, Prezidanto de la Respubliko, de Ambasadoro D-ro José Carlos de Macedo Soares, prezidanto de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", ni elĉerpis la jenon:

"ESPERANTO ĈE LA BRAZILA STATISTIKO. — Dum la dua ordinara kunsido de sia Ĝenerala Kunveno, okazinta en 1938, la Konsilantaro aprobis Rezolucion por la adopto de Esperanto, kiel helpa lingvo, ĉe la aktivecoj kaj publikigaĵoj de la Instituto.

Tiu iniciativo, kiu logike enhavas la rekonon de la internacia lingvo, kiel utila instrumento por la elmontrado de Brazilo, tra la statistiko, al la aliaj civilizitaj popoloj, daŭrigadis la faron okazintan tridek jarojn antaŭe, kiam la Ĝenerala Direkcio de Statistiko organizis la "Memorigan Bultanon de la 1908a Ekspozicio", kun la antaŭparolo kaj la titoloj de la statistikaj tabeloj tradukitaj esperanten.

Poste, diversaj aliaj paŝoj, orientitaj de la samaj celoj, estis farataj de la Instituto, inter kiuj estas la enmeto de la lernado de la helplingvo, kiel deviga instrutemo, ĉe la Perfektiĝa Kurso kreita por la oficistoj de la centraj statistikaj organoj kunligitaj kun ĝi.

Meritas ankaŭ esti citata, precipe pro la reefiko kaŭzata sur la eksterlandajn esperantistajn rondojn, la ĉiujara publikigaĵo de la "Statistika Resumeto", apartaĵo de la "Statistika Jarlibro de Brazilo", tradukita esperanten kun la celo disvastigi tra la tuta mondo kelkajn esencajn informojn pri la Brazilo vivo.

Ankoraŭ obeante tiun celon la Instituto eldonos specialan verkon pri la



Kunsido de la malfermo de 1^o Perfektiĝa Kurso, okazinta en 1941. Supre la estraro, kiu prezidis la laboron. Malsupre la gelernintoj kaj aliaj personoj.

Historio kaj Geografio de nia lando, kies ellaboradon ĝi komisiis al du kleraj specialistoj, famekonataj kiel kompetentuloj, nome: profesoroj Delgado de Carvalho kaj Jônatas Serrano.

Ĉe tiuj iniciativoj la Instituto havis la valoran kunlaboradon de Brazilo Ligo Esperantista, persone reprezentata de ties sindona prezidanto, instruisto Alberto Couto Fernandes."

"PERFEKTIĜA KURSO. — Laŭ la Rezolucio n.º 224, de la 26a de Julio, la Ĝenerala Kunveno de la Konsilantaro reguligis la Perfektiĝan Kurson, kiu, ekde 1942, okazos ĉiujare dum la monato Septembro, kaj estigis, ke ĝia

programo konsistos el la jenaj instru-temoj: I — Teoria Statistiko; II — Aplikata Statistiko; III — Homa Geografio de Brazilo; IV — Esperanto".

O ESPERANTO NA ESTA- TÍSTICA BRASILEIRA

Extraímos do RELATÓRIO de 1941 apresentado ao Excelentíssimo Senhor Doutor Getúlio Vargas, Presidente da República, pelo Embaixador Dr. José Carlos de Macedo Soares, presidente do "Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística", os seguintes trechos:

"O Esperanto na Estatística Brasileira". — Na segunda sessão ordinária de sua Assembléa Geral, verificada em 1938, o Conselho baixou uma Resolução, adotando o Esperanto, como língua auxiliar, nas atividades e publicações do Instituto.

Essa iniciativa, que implicava o reconhecimento do idioma internacional como um instrumento útil na revelação do Brasil, através da estatística, aos outros povos civilizados, deu continuidade ao precedente verificado trinta anos antes, quando a Diretoria Geral de Estatística organizara o "Boletim Comemorativo da Exposição de 1908", com a respectiva introdução e os cabeçalhos dos quadros estatísticos vertidos para o Esperanto.

Posteriormente, outras providências, orientadas na mesma ordem de objetivos, foram tomadas pelo Instituto, entre elas a inclusão do estudo do idioma auxiliar como matéria obrigatória do Curso de Aperfeiçoamento instituído para os funcionários dos órgãos centrais de estatística articulados em seu sistema.

Merece referência, igualmente, sobretudo pela repercussão que vem tendo nos círculos esperantistas de todo o mundo, a publicação anual do "Statística Resumeto", separata do "Anuário Estatístico do Brasil", vertida para o Esperanto com o objetivo de vulgarização mundial de algumas informações essenciais sobre a vida brasileira.

Ainda para atender a êsse objetivo, editará o Instituto um trabalho especial sobre a História e a Geografia do nosso país, cuja elaboração confiou a dois ilustres especialistas, de reconhecida autoridade na matéria: os professores Delgado de Carvalho e Jônatas Serrano.

Em todas essas iniciativas, tem contado o I. B. G. E., com a valiosa colaboração da Liga Esperantista Brasileira, na pessoa de seu dedicado presidente, professor Alberto Couto Fernandes."

"Curso de Aperfeiçoamento. — Pela sua Resolução n.º 224, de 26 de julho, a Assembléa Geral do Conselho regulamentou o Curso de Aperfeiçoamento, que, a partir de 1942, se realizará no mês de setembro de cada ano, e estabeleceu que de seu programa constarão as seguintes matérias: I — Estatística teórica; II — Estatística aplicada; III — Geografia humana do Brasil; IV — Esperanto.

Brazila Ligo Esperantista

Je la 13a de Junio de 1942, ĉe la sidejo de la Societo de Geografio de Rio de Janeiro, okazis ordinara ĝenerala kunsido de Brazila Ligo Esperantista, prezidita de s-ro ing. Alberto Couto Fernandes, dumviva prezidanto de la Ligo, kaj sekretariita de s-roj prof. João B. de Mello e Souza, João Teles da Silva kaj f-ino Iraní Baggi de Araujo, kun la ĉesto de reprezentantoj de la jenaj grupoj filiitaj: "Brazila Klubo Esperanto", "Grupo Esperantista de Baía", "Grupo Esperantista Humberto de Campos", "Associação Esperantista Pernambucana" kaj "Associação Esperantista do Meyer" kaj de diversaj liganoj.

La prezidanto legis sian raporton rilatan al la periodo inter la du kunsidoj. Laŭ propono de D-ro Luiz Porto Carreiro Neto, estas per aklamado reelektita la estraro, kiu estis finigonta sian komision, nome: Viceprezidanto — d-ro Carlos Domingues, Ĝen. sek. — prof. João B. de Mello e Souza, Unua sek. — s-ro João Teles da Silva, Dua sek. — f-ino Iraní Baggi de Araujo kaj Kasisto — s-ro Odilo Pinto.

La ĝenerala sekretario legis la projekton pri reformo de la regularo pri ekzamenoj de Esperanto, kiu estas aprobita kun malgranda ŝanĝo proponita de s-ro Ismael Braga.

Laŭ propono de s-roj d-ro Carlos Domingues, d-ro Porto Carreiro Neto kaj Ismael Braga, estas unuanime aprobita voĉdono de danko al s-roj Ambadoro José Carlos de Macedo Soares kaj d-ro Mário Teixeira de Freitas, respektive, prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", kaj, laŭ propono de s-roj Caetano Coutinho, A. Couto Fernandes kaj prof. J. B. Mello e Souza, oni aklamis kunlaborantaj membroj de la Ligo profesorojn Jônatas Serrano kaj Domingues Barbosa, pro iliaj servoj al Esperanto. La prezidanto proponis, ke oni sendu dankan telegramon al s-ro Admiralo Raul Tavares, prez. de la Geografia Societo, pro la intereso, kiun li elmontradis por la Ligo Esperantista.

Prof. Mello e Souza dankante sian reelektadon bedaŭras, ke, pro siaj laboroj, li ne povos labori por Esperanto kiel li deziras.

La prezidanto fermante la kunsidon salutas s-ron Pastron Agostino Stelacci, kiu estas veturonta al Italujo, dezirante, ke li povu baldaŭ reveni al Brazilo, kie li havas multaj amikojn.

Regulamento dos Exames de Esperanto

A LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA institue, para si e para os grupos filiados, duas espécies de exames: *elementar* e *superior*.

Ao exame elementar corresponde um certificado de estudo (*atesto pri lernado*). O superior dá direito ao diploma de *profesoro aprobita*.

EXAME ELEMENTAR

O exame elementar de Esperanto constará de duas provas: escrita e oral.

Prova escrita: a) tradução para o Esperanto de um trecho do livro de exercícios indicado para o curso; b) tradução para o português de um trecho ditado, de 12 a 15 linhas, de um livro fácil em Esperanto.

Prova oral: a) leitura e tradução de 16 linhas de um dos livros recomendados para a prova escrita; b) arguição sobre questões gramaticais que o texto sugerir.

EXAME SUPERIOR

O exame superior constará de três provas: escrita, oral e prática.

Prova escrita: a) fazer em Esperanto uma carta ou descrição sobre assunto dado no momento pela comissão examinadora, ou traduzir para o Esperanto 12 a 15 linhas de boa prosa brasileira; b) traduzir para o português, sem auxílio de dicionário, 20 linhas ditadas de prosa da *Fundamenta Krestomatio*, ou de outro livro com texto escrito por Zamenhof.

Prova oral: a) leitura e tradução de um trecho de 20 linhas da *Fundamenta Krestomatio*, ou de outro livro com texto escrito por Zamenhof; b) arguição em Esperanto sobre gramática, história e literatura da língua.

Prova prática. — Exposição de um ponto de gramática, tirado à sorte, que terá, no mínimo a duração de 15 minutos.

Em qualquer dos dois exames, as notas serão cotadas de 0 a 100. Nos exames elementares serão aprovados *com distinção* aqueles que obtiverem a média 100 ou mais de 95; *plenamente*, os que tiverem mais de 60 e menos de 95; e *simplesmente*, os de média superior a 30 e inferior a 60. Nos exames superiores não haverá graus de aprovação: o candidato será, ou não, aprovado.

EXAMINADORES

Para os exames elementares a comissão examinadora será constituída pelo professor do curso, o presidente do grupo, que será o presidente da banca, e um terceiro por este indicado.

A ata será lavrada em livro especial, que ficará no arquivo do grupo. Fim do o exame, será remetida cópia da ata à *Liga Esperantista Brasileira*, que expedirá os certificados.

Para o exame superior a banca examinadora será constituída, na séde da B. L. E., pelo seu presidente, que nela terá a mesma função, e por dois professores diplomados por ele escolhidos, e, nos Estados, pelo presidente do grupo e por dois esperantistas por este indicados, sendo que pelo menos um membro da comissão deve ser *professoro aprobata*.

TAXA DE EXAME

A inscrição para o exame elementar é gratuita. A retirada do certificado custará 5\$000. Esse certificado será passado pela B. L. E., e entregue ao candidato pelo grupo filiado. Para isso, o grupo, juntamente com a cópia da ata, deverá remeter à Liga 50% da importância dos certificados requeridos. Estes serão assinados pelos presidentes da Liga e do grupo e pelo professor do curso.

Para exame superior, o candidato deverá pagar, no ato da inscrição, a quantia de 10\$000, que caberá toda à Liga. A ata dos exames, no Rio de Janeiro, será lavrada em livro especial, guardado no arquivo da Liga. Nos Estados, o termo será lavrado em livro especial do grupo — termo do qual se remeterá cópia à Liga, onde ficará arquivada. O diploma será conferido pela B. L. E. e assinado pelo presidente e secretário geral da mesma e pelo diplomado.

EXAMES POR CARRESPONDÊNCIA

Para os candidatos residentes longe da séde de grupo filiado fica instituído um certificado de estudos (*atesto pri lernado*) por correspondência.

A prova única de exame constará: a) de uma tradução para o português de um trecho de 20 a 25 linhas, de prosa da *Fundamenta Krestomatio*, ou de outro livro com texto escrito por Zamenhof. b) resposta a algumas perguntas gramaticais que o texto tiver sugerido ao organizador do ponto; c) versão para o Esperanto de um texto português fácil, de 12 a 15 linhas.

A taxa de exame será de 5\$000, pagos no ato da inscrição ficando com o direito de receber gratuitamente o certificado, caso seja aprovado.

Os textos serão examinados por dois professores indicados pelo presidente da Liga.

OBSERVAÇÕES

Podem candidatar-se aos exames de Esperanto quaisquer pessoas, tenham

ou não, seguido os cursos mantidos pelos grupos. Ao exame superior, porém, só será admitido quem já tiver sido aprovado em exame elementar.

DISPENSA DE EXAME

A *Liga Esperantista Brasileira*, durante suas sessões plenas, poderá conferir o título de *professoro aprobata* aos que hajam publicado em Esperanto obras de reconhecido valor — mediante proposta subscrita por três professores diplomados.

GRAVA KONKURSO

La eldonista entrepreno Livraria da Federação Espírita Brasileira, *kun sidejo en Rio de Janeiro, kiu en la lastaj jaroj publikigis kvar librojn en Esperanto kun kontentiga sukceso, decidis komenci la eldonadon de la plej famaj spiritalaj verkoj en bona Esperanto por formi bibliotekon de 100 volumoj, kiu devas iom post iom aperi en Esperanto. Por ĉiu volumo estas starigita premio de 10:000.000 (dek mil milrejsoj) por la aŭtoro de la plej bona traduko.*

La unua libro tradukota estas la franca aŭtoro Allan Kardek "Le Livre des Esprits" (La libro de la Spiritoj).

La tradukoj por la konkurso devas troviĝi ĉe la Administranto de tiu Libro ĝis la 30a de Junio 1943a. Kiam ili estos ricevitaj, la eldonista entrepreno petos de la jenaj esperantistaj asocioj: Internacia Esperanto-Ligo, Brazila Ligo Esperantista kaj Amerika Esperanto-Akademio la elekton de juĝantaro absolute fidinda, kiu decidus pri la plej bona traduko.

Kiu dezirus partopreni tiun gravan konkurson, bonvolu peti al "Livraria da Federação E. Brasileira — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro — Brasil" ekzempleron de broŝuro, kiu enhavas ĉiujn necesajn informojn.

ARGENTINO

Okazis en Córdoba, dum la 3a kaj 4a de Aprilo nunjara la Unua Jarkunveno de la "Argentina Esperanto-Ligo", kiu havis kontentigan sukceson. Tiam oni elektis novan estraron de la Ligo, kiu konsistas el la jenaj geliganoj: Prez. — d-ro E. Balech, Unua vicprez. — d-ro Quiña Gonzáles, Dua vicprez. — d-ro J. Scolnik, Ĝen. sek. — s-ro Tibor Sekelj, Sek. de Instruado — S-ino Margarita Hergott, Sek. de propagando — S-ro A. Corral, Kas. — S-ino Sofia Portnova, vickas. — S-ro Vicente Albamonte, Red. de la organo — S-ro Georgo Hess.

Estas aprobataj, inter aliaj, la jenaj

BRAZILA MOVADO

La Brazila revuo kiel kutime rakontas pri la aktiveco de la Brazila Ligo. Speciale interesa estas artikolo pri la vizito de la usonaj samideanoj s-ro George Connor kaj f-ino Doris Tappan. Ili pasigis tutan monaton en Rio-de-Janeiro kaj forvojaĝis en la sama tago, kiam foriris la speciala portugala ambasadoro. Samideanoj Couto Fernandes, Gomes Braga, d-ro Carlos Domingues kaj aliaj profitis la ĉeestadon de la usonaj gesamideanoj por vigla kaj utila propagando de la helpa lingvo. Tiamaniere ili ankaŭ lerte montris al la portugalaj vizitantoj, ke la movado en Brazilo estas grava, kaj ke nia Esperanto meritas la atenton de la portugalaj altrangaj estancoj. Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko akceptis la usonanojn, kiuj parolis esperante antaŭ la gelnantoj de la instituto. Je aŭdienco ĉe la usona ambasadoro tiu ĉi diris, ke li plezure ĉeestos la kunsidon de la Instituto Brazilo-Usono, kaj ke li kun intereso vidas tiun movadon de amerika interamikceco pere de neŭtrala lingvo. S-ro Connor kaj f-ino Tappan ankaŭ vizitis la ministron por Eksterlandaj aferoj, diversajn instituciojn k. t. p. F-ino Tappan gvidis bonsukcesan kurson de Esperanto laŭ la Oseh-metodo. Kaj antaŭ la foriro ili parolis en radio per Esperanto en "Horo de Brazilo". Vere propaganda vizito! F-ino Tappan kaj s-ro Connor meritas sinceran dankon pro neordinare grandstila propaganda laboro! (El "Esperanto Internacia" — Marto-Aprilo 1942).

decidoj: Ke la Dua Argentina Kongreso okazu en Buenos Aires dum pasko 1943a; prokrasti la plenumon de la decido de la Unua Kongreso pri eldono de ŝlosiloj kaj anstataŭe presi plurpaĝan propagandilon.

Oni decidis ankaŭ eldoni, pere de seninteresaj monpruntoj, perkorespondan kurson, kiu estos samtempe utiligebla kiel ordinara lernolibro. D-ro J. Scolnik sin proponis verki la kurson kun la helpo de sia fratino, D-rino Rosa Scolnik, kaj antaŭprunti la necesan monon por la eldono.

KUBO

La monata revuo "Papeles", eldonita de "Asocio de Kubaj Anoncantoj", en Habana, publikigis en sia N.º 2a de l' 3a volumo, hispanan tradukon de la artikolo titolita "Patagonio" aperinta en Esperanto en "O Brasil Esperantista". Faris la tradukon S-ro Heriberto Cociña, delegito de IEL en tiu ĉefurbo.

LA RIVERETO KAJ LA INUNDO

(Portugallingve verkis Antônio Sales, poeto el Stato Ceará.)

De riveret' humila sur la klaran
vejneton la sezon' pluvoza ŝtormis
kaj baldaŭ en torenton bruegaran,
kun akvo makulita, ĝin transformis.

Fiera, gojbruante ĝi ekkuris
rapide, kaj ŝaŭmante kunprenadis
arbustojn, kaj bordarbojn eĉ teruris,
kaj multjaran trunkegon saltinadis.

El la kuŝej' eliris ĝi impete,
sieĝis forte pacan murunguon (1),
moligis ĝin, faligis, kaj disjete
etendis tra l' arbaro sian fluon.

Kaj al kampan', volanta, laŭkutime,
transpasi ĝin, ĝi kriis, kun deliro
de ulo minacanta bravanime:
"Estas malpermesata la transiro!"

Ĝi perdis la purecon alitempan
kaj ĉarmon, kiu kanti ĝin stimulis
dolĉe, kiam l' aŭronon belprintempan
kaj la ĉielon puran ĝi spegulis.

Glorplenaj tagoj estis tiuj, kiam
de la inundo vivis ĝi ebria;
la brutoj for de ĝi fuĝadis tiam,
haltadis homoj apud bordo ĝia.

Ŝvelinte per malsana vanfiero,
la riveret' murmuris al l' akvaro:
"Mi estas ja rivero! jes, rivero!
Triumfe mi vojaĝos al la maro!"

Kaj oni diras eĉ ke, la racion
perdante, ĝi deklaris: "Temi devos
la maro mian forton kaj defion,
kaj la Neptunan sceptron mi ricevos."

La pluvoj ĉesis, ĉesis la inundo;
la riveret' mutiĝis, malplezuris,
perdadis pli kaj pli de l' akvabundo,
kaj en kuŝejon sian fine kuris.

Kaj venis la somer'; la ter' kamplanda
ĉe la brulanta tag-varmeg' ardadis;
la riveret', iĝinte tre malgranda,
nur la piedojn de l' vadant' banadis.

Birdeto, ĝin laŭdinta dum la horoj
de ĝia povo, tiam mokparolis:
"Ĉu tiu rivereto ĉi, sinjoroj,
estas kiu rivero esti volis?!"

Ke l' rivereto estis vantulspeco,
ni vidas en ĉi tiu historio;
sed ĉe l' inund' de gloro aŭ riĉeco
perdiĝas same multa hom-racio.

Revista Brasileira de Geografia (BRAZILA REVUO DE GEOGRAFIO)

Ni ricevis la unuan numeron de la kvara jaro de tiu grava trimonata revuo, oficiala organo de la *Nacia Konsilantaro de Geografio*, fako de la *Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko* registara departemento. Ĝi enhavas 256 paĝojn sur luksa papero kaj kvin ĉefartikolojn kun resumo en 5 naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Jen la titoloj de tiuj artikoloj: "Cuiabá, alfluaĵo de rivero Paragvajo", de ing. Virgílio Correia Filho; "Geopolitiko kaj Politika Geografio", de Prof. Evarado Backheuser; "La aktuala stato de la grundoj ĉe la Komunumo de Campinas", de ing. José Setzar; "La urba geografio kaj ĝia influo sur la supraĵa kaj la subgrunda urbanismo", de ing. Jerônimo Cavalcanti; kaj "Brazila reliefo", de Prof. Antônio Várzea.

Jarabono: Unu dolaro kaj duono.

Revista Brasileira de Estatística

(BRAZILA REVUO DE STATISTIKO)

Ni ricevis la Numeron Sepan de la dua jaro, de tiu tre grava revuo, kiu enhavas 812 paĝojn kaj estas oficiala organo de la *Nacia Konsilantaro de Statistiko* kaj de la *Brazila Statistika Societo* kaj ĉiu trimonate eldonita de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko". Ĝi publikigas detalan priskribon pri la **PERFEKTIGA KURSO** okazinta ĉe la Instituto dum la monatoj Julio kaj Septembro de 1941. Kiel ni parolis en du antaŭaj numeroj de nia bulteno, la programo de tiu kurso enhavas la instruadon de Esperanto, kiu estas la helplingvo de la Instituto. Ĝi aperigis ankaŭ du fotografaĵojn faritajn dum la ferma kunsido de la kurso, kies instruinto kaj asistinto estas, respektive, s-roj A. Couto Fernandes kaj Mario Ritter Nunes.

HELPO AL LA FAMILIO ZAMENHOF

Antaŭ listo	895\$000
José Dartagnan	10\$000
Samideano	40\$000
Boris Eston kaj du anonimu- loj el Pelotas	50\$000
Jechiel Kafensztok	25\$000

LOGOGRIFO

Ni ricevis korektan solvon de la logogrifo de s-ro Targino Soares, aperinta en la Jan.-Marta numero de nia bulteno senditan de s-roj Hermes Pitta, el Salvador, Stato Baía, kaj João Sabino Bueno, el Quaraí, Stato Rio-Grande-do-Sul, al kiuj ni sendis, kiel premion, esperantan libron.

(1) **Murunguo**, vegetalo el familio de legumenacoj.

Impresoj pri vizito al "La Brazila Industria Kompanio Ford" en Stato Pará



Kaŭĉukarboj plantitaj de la Kompanio, ĉe Fordlândia
(Kliŝo de "Revista Brasileira de Geografia".)

D-ro Gastão Cruls, konata aŭtoro de studoj pri la Amazonasa regiono, prezentas, en tiu ĉi artikolo, la impresojn de sia vizito al la "Companhia Ford Industrial do Brasil", kiu, en ŝtato Pará, faras grandajn plantadojn de kaŭĉukarboj (*Hevea brasiliensis*), kies "Lutea" sin destinas, precipe, al la industrioj de la Kompanio Ford, en Usono.

La koncesio, kiu okupas 1.000.000 da hektaroj, estas lokita en du punktoj ĉe la dekstra marbordo de rivero Tapajós, nome Belterra, proksime de la urbo Santarem, kaj Fordlândia, pli supre.

Apartenis al Amazonio, ĝis la fino de la lasta jarcento, la monda superregado de la kaŭĉuka produktado. Post la plantadoj en Hindujo ekfiniĝis ĝia prestiĝo. Sen simetria produktado, kun arboj lokitaj kelkafoje je deko da metroj unuj de la aliaj, estis malfacila la rikolto de la "lakto", kaj tio plikarigis la produkton.

Ĉe la plantado ĵus farita de la "Ford Industrial do Brasil" estas obeataj la plej modernaj procedoj por esplorado. Krom tio, oni plibonigas la kvaliton de la kaŭĉuko per la greftado de "hevea" el orienta deveno. Estas nepre kurioze, diras la aŭtoro, ke la brazilaj plantoj estas plibonigataj per la idoj de l' semoj el Amazonio senditaj al Anglujo en 1876.

Tiu ĉi greftado estas farataj, kiam la planto atingas la aĝon de unu jaro kaj duono kaj la "olhos" (burgonoj) estas prenitaj el "mudas" (plantidoj)

impörtitaj el Hindujo antaŭ la nuna malpermeso tie ekzistanta. Cetere tiu ĉi malpermeso ne difektos la planojn de la Kompanio. Ĝi jam havas, zorgege konservitajn, centojn da trunkoj de tiu menciita "hevea".

La kulturaj flegadoj estas seninterrompaj. La plantadoj estas farataj en "quadras" (kvadrataj bedoj) je 161,88 km². En ĉiu "cova" (terkavaĵo) oni plantas 3 semojn, en distancoj de 5 metroj inter la "covas". Inter la "quadras" oni lasas kurtenon de arboj, kiel ŝirmilon kontraŭ la ventoj kaj najbaraj "queimadas" (bruladoj).

En la konvena epoko oni faras selekton, elŝirante la "brotos" (burgonojn) malpli rezistajn. Jam estas plantitaj (1938) 2.400.000 kaŭĉukarboj en Belterra kaj 1.600.000 en Fordlândia, kaj oni esperas, ke la kompanio plantos 2.000 hektarojn da ili ĉiujare.


Ili luktas kontraŭ la manko de brakoj, malgraŭ tio, ke la sanigaj kondiĉoj estas bonaj kaj la Kompanio sufiĉe pagas siajn laboristojn.

Bonegaj instalaĵoj — hospitaloj kun moderna medicin-hirurgia aparataro; lernejoj, legejoj por oficistoj kaj laboristoj, elektraj uzinoj, glacifabrikejoj k. c. La fotografaĵoj, ilustrantaj la artikonon, elmontras la komforton ekzistantan en la koncesio. Naŭ milionoj da dolaroj jam estas elspezitaj kaj 19 milionoj ankoraŭ estas elspezotaj.

Rilate al la oficistaro la direktoro-administranto, s-ro A. Johnston, laŭdas la inteligentecon de la brazila laboristo, kaj d-ro Kenneth Waddel, ĉefo de la sanitaraj servoj, asertas, ke tiu ĉi havas rigidan karakteron, aldonante, ke la indicoj rilataj al la sifiliso kaj alĥoolismo estas pli malaltaj ol tiuj diskonigitaj tiurilate.

La aŭtoro finas sian artikolon antaŭvidante ke, pro sia kvalito kaj pli granda proksimeco de la plej granda konsumanta merkato — Nordameriko, la brazila kaŭĉuko reakiros sian antaŭan prestiĝon.

(Resumo aperinta en la "Revista Brasileira de Geografia", oficiala organo de "Brazila Instituto de Geografia kaj Statistiko").



Loĝdomoj de la oficistoj laborantaj ĉe la kontoro de la Kompanio, en Belterra
(Kliŝo de "Revista Brasileira de Geografia".)

VOJAĜO TRA BRAZILO

Dum la monatoj Januaro kaj Februaro 1942 mi entreprenis vojaĝon tra nia najbara lando Brazilo, kiu estas trifoje pli granda ol la Argentina Respubliko.

Mi vizitis antaŭe la akvofalojn de l' Iguassú, vera mirindaĵo de la Naturo, kies grandiozan spektaklon mi neniam forgesos.

Poste, mi enŝipiĝis en Puerto Aguirre. En Foz do Iguassú, unua brazila haveno, la aŭtoritatoj petis niajn dokumentojn. Ni elŝipiĝis en Porto Mendes, kie malgranda vagonaro transportis nin al La Guaira. Tie ĉi ni vizitis la kaskadojn Sete Quedas (Sep Faloj), kiuj estas tre belaj, sed ne tiel grandaj kaj imponaj kiel la akvofaloj de l' Iguassú.

Sur ŝipo mi daŭrigis mian vojaĝon laŭlonge de la rivero "Alto Paraná". Dum tri tagoj ni nur vidis la riveron, kiu mallarĝiĝas iom post iom; ties akvoj malhelaj turniĝas furioze.

Oni bone vidas la du bordojn, kovritajn de densa praarbaro. Inter aliaj kreskaĵoj mi ofte rimarkas "ambay" (elparolu: ambai) kaj "tacuara" (speco de granda kano).

Fine ni alvenis al haveno Presidente Epitacio, kie ni envagoniĝis.

Ni faris 30-horan vojaĝon ĝis ni alvenis al São Paulo. La vagonaro trairas la ŝtaton São Paulo laŭ ĝia tuta longeco. La pejzaĝo estas plaĉa: montoj, ne tro altaj, kaj pitoreskaj valoj, kovritaj de palmoj, bananujoj, kafkaj koton-arboj, k. t. p.

Tiu regiono estas loĝata de multaj eksterlandanoj: italoj, japanoj, hungaroj, germanoj.

Fine, ni alvenis al São Paulo, la dua brazila urbo laŭ ĝia loĝantaro (1.200.000) kaj unua industria urbo de la tuta Latinameriko.

Mi pasigis plurajn tagojn en tiu grava urbo. Mi vizitis la muzeojn, ĉefe la Ipiranga-n, la Instituton Butantan kaj aliajn vidindaĵojn.

Poste, mi iris al Santos, kie mi pasigis tri ravajn tagojn en la marbordo. Guarujá, kiu kuŝas en insulo Santo Amaro, apud Santos, estas la plej bela marbordo de Sudameriko, laŭ mia opinio.

Mi ankaŭ iris al Poços de Caldas (Ŝtato Minas Gerais), tre grava varmobanastacio, kiel alfluas ĉieaj mal-sanuloj.

Fine, mi iris al Rio de Janeiro.

Eble, nenion novan mi povas diri pri tiu urbo, kiu certe meritas la alnomon "Mireginda urbo". Mi tie pasi-

gis 16 ĉarmajn tagojn, kaj eble ne vidis ĉiujn vidindaĵojn.

Kiel en kalejdoskopoj, mi vidis la montojn Korkovado kaj Sukerpano, la golfeton Guanabara, la insulon Paquetá, la marbordojn, la Botanikan Ĝardenon, k. t. p., k. t. p.

Mi vojaĝis al Petrópolis per omnibuso, sur bonega ŝoseo, kaj ĝuis miregindan tropikan pejzaĝon. Ankaŭ mi iris al Terezópolis, al Niteroi kaj ĝiaj marbordoj... Mi ne scias tion, kio plej plaĉis al mi, ĉar ĉio estas belega, fantazia.

Fine mi ĉeestis la karnavalajn festojn sur la stratoj kaj avenuoj. Mi ĉefe memoras la balojn dum Dimanĉo, la 15an Februaro nokte, sur la Avenuo Rio Branco, kie amasego da personoj freneze dancis laŭ melodioj disaŭdigataj de laŭtigiloj.

Mi faris du vizitojn al la sidejo de Brazila Ligo Esperantista kaj Brazila Klubo "Esperanto". Mi tie konatiĝis kun la eminentaj samideanoj Alberto Couto Fernandes kaj Carlos Domingues kaj pluraj aliaj geesperantistoj, kiuj tre afable traktis min.

Mi faris tri publik-paroladojn en la brazila ĉefurbo, en unu el kiuj, okazinta en la salonego de Spiritista Brazila Federacio, estis milo la aŭskultantoj. Mi estis prezentita al la publiko de mia eminenta amiko kaj samideano Ismael Gomes Braga.

Iun dimanĉon okazis tre agrabla ekskurso al Urba Parko (Parque da Cidade). Partoprenis fraŭlinoj Iraní Baggi de Araujo, fratinoj Malheiro, D-ro Carlos Domingues kaj aliaj personoj, kies nomojn mi ne memoras. Mi tie pasigis belan tagon meze de sorĉa Naturo kun plaĉa akompano.

Invitite de s-ro Ismael Gomes Braga, mi vizitis la stacion "Radio Nacional", kie mi ĉeestis lecionon pri gimnastiko de profesoro Osvaldo Diniz Magalhães. Ankaŭ mi iris al "Radio Transmissora", kie Ismael Gomes Braga disaŭdigis lecionon pri Esperanto. Tiu ĉi samideano ankaŭ invitis min viziti la presejon de la Spiritista Federacio, kie multaj esperantaĵoj estas presitaj. Oni ĵus eldonis, en alia presejo, "La Vidvino"-n, ĉarman romanon, kiun mi poste legis.

Kun bedaŭro mi forlasis la Miregindan Urbon kaj direktis min suden. Mi vizitis Kuritiba-n, ĉefurbon de la ŝtato Paraná; Paranaguá, haveno ligita al Kuritiba per tre pitoreska fervojo. Mi ankaŭ faris viziton al Florianópolis, ĉefurbo de la ŝtato Sankta

URBO SALVADOR

Brazila Instituto de Geografio kaj Statistikoj, Rio-de-Janeiro. Prezo ne montrita, sed supozeble ricevebla de la Instituto por unu respondkupono.

En la lasta numero de *Esperanto Internacia* estis menciita la alpreno de Esperanto ĉe la suprenomita grava Instituto: kaj nun aperas el ĝia presejo ĉi tiu notinda eldonaĵo. La urbo Salvador (ofte nomita ankaŭ São Salvador kaj Bahia), ĉefurbo de la brazila ŝtato Bahia, estas unu el la plej gravaj kaj historiaj centroj de la nacia vivo: kaj la nuna broŝuro celas ilustrigi ĝin per serio de bonegaj fotografaj bildoj, kun priskriboj, antaŭta de elokventa enkonduko verkita de Prof. Pedro Calmon. Ĉio estas en Esperanto. Ne ĉiuj Esperantistoj, eble, bone scias ke Brazilo jam havas "eŭropecan" kultur-historion de kvar jarcentoj, sed tion oni bone konstatas, gardante la bildojn de belaj preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj de Salvador, kelkaj el tiuj datigas de la 16a kaj aliaj de la 17a aŭ 18a jarcento: inter tiuj de la 17a jarcento estas la bela Magistrato de la urbo.

Urbaj kaj ŝtataj konstruaĵoj, placoj kaj stratoj, kaj aro de imponaj preĝejoj kaj monaĥejoj, estas ĉi tie prezentataj por nia admiro. Ja ili estas grandparte admirindaj, kaj ĉiuj interesaj. Eble ne ĉiuj rigardantoj egale ŝatos la ankaŭ montratajn konstruaĵojn en moderna "utilisma" stilo, kiuj egale povus troviĝi en iu nova urbo en Usono aŭ Sovetio kaj ne estas aparte karakterizaj de Brazilo, aŭ de la urbo Salvador mem: tamen pri tio neniel respondas la eldonintoj de la nuna bildaro, ilustranta aktualece ne nur la longedaŭran kulturon sed ankaŭ la modernan evoluon de la grava havena urbo.

(El "*Esperanto Internacia*" — *Mar-to-Aprilo 1942*).


Katarino kaj Porto Alegre, ĉefurbo de Rio-Grande-do-Sul.

Uruguaiana estas la lasta brazila urbo, kiun mi vidis. Poste mi trairis la riveron Uruguai kaj eniris en Paso de los Libres (Corrientes). Per fervojo mi iris al Concórdia (Entre Rios), kie mi faris paroladon pri naturo.

Mi trairis la provincon Entre-Rios per omnibuso ĝis Paraná; per pramo mi trapasis la samnoman riveron kaj alvenis al Santa Fé. Fine, omnibuso transportis min al Córdoba, mia urbo, post foresto de du monatoj kaj duono.

D-ro JAIME SCOLNIK

Associação Esperantista do Meyer



Solena inaŭgura kunsido de la "Associação Esperantista do Meyer".
Supre, la estraro, kiu prezidis la kunsidon. Malsupre, parto de la ĉeestantaro.

La 30an de 1^a nunjara Marto kelkaj entuziasmaj geesperantistoj loĝantaj ĉe la ĉirkaŭaĵoj de Rio de Janeiro kunvenis kaj fondis grupon, kiu ricevis la nomon "Grupo Esperantista do Meyer". Tiam oni elektis ĝian unuan estraron, kiu konsistas el la jenaj personoj: S-ro Délio Pereira de Souza — prez., s-ro Octaviano da Silva Lopes — ĝen. sek., s-ro Aldino de Freitas — unua sek., f-ino Oscarina Onette Ferreira — dua sek., s-ino Arlette Costa de Souza — kas., s-ro Nelson Pereira de Souza — helpkas. kaj f-ino Suely Alves de Souza — bibliotekisto. Poste oni decidis organizi feston, por solene ekposedi tiun estraron, kaj aliĝi al BLE kaj IEL. Tio ĉi plenumiĝis per la aliĝo de kvin el ĝiaj estraranoj.

Je la 9a de Junio, ĉe la Teatro "Cordélia Ferreira", okazis la festkunveno de tiu asocio, kiu havis grandan brilon. Ĉe la ĉeestantaro, kiu plenigis la antaŭurban teatron, vidiĝas reprezentantoj de kulturaj, komercaj kaj religiaj asocioj simpatiantaj al Esperanto, kies celo estas la universala frateco, kaj membroj de "Brazila Ligo Esperantista".

La estraro ricevis, inter aliajn, gratulan telegramon de S-ro Prezidanto de la Respubliko kaj leteron de la Ministro por Edukado.

Prezidis la kunvenon d-ro Venancio da Silva, tre malnova esperantisto kaj honora vicprezidanto de BLE. S-ro Délio Pereira de Souza, prez. de la asocio, entuziasme deklamis la faman poezion de Zamenhof — Sub la verda Standardo. Post la legado de 1^a protokolo de la fonda kunveno faris inte-

resan paroladon pri Esperanto la fervorega propagandisto s-ro Ismael Gomes Braga.

Ĉe la dua parto de la kunveno knabinoj deklamis poeziojn, el kiu ni citas la portugalan tradukon de "La Espero", deklamitan de knabino Cibele Rego. Poste s-ino Arlette Costa de Souza bele deklamis la poezion "Kanto de l' Ekzilo", tradukitan el la originalo de Gonçalves Dias. Ankaŭ prof. Jair de Magalhães deklamis poezion en la portugala lingvo.

"A Vanguarda" publikigis noton kaj kliŝon pri tiu festo.

La provizora sidejo de la "Associação Esperantista do Meyer" estas en la Strato Arquias Cordeiro, n.º 295 — supera etaĝo, kie funkcias senpaga kurso de Esperanto.

Ke la entuziasmo de la fondintoj de tiu asocio ĉiam kresku, estas nia deziro!

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Durante o Ano de 1941 pagaram suas quotas à BLE e IEL, por intermédio de grupos filiados ou isoladamente:

Brazila Klubo Esperanto . . .	47	sócios
S. Paulo Esperanta Klubo . . .	7	"
Pernambuka Esperanto-Asocio. . .	7	"
E. Asocio Rio-Grande-do-Norte . . .	7	"
Centro Esperantista de Santos . . .	5	"
Grupo Esperant. de Araguaçu . . .	5	"
Katolika Esperantistina Klubo . . .	5	"
"Carlo Bourlet" Esp.-Klubo . . .	5	"
G. Esperantista de Limoeiro . . .	5	"
Esperanta Instituto de Assis . . .	5	"
G. Esp. Humberto de Campos . . .	5	"
Esperanta Grupo de Bafá . . .	4	"
G. Esp. "Ismael Gomes Braga" . . .	4	"
Sudbrazila Esperantistigilo . . .	3	"
Sócios Isolados	28	"

142

NOVAJ LIBROJ EN ESPERANTO

De la "Livraria da Federação E. Brasileira" — Avenida Passos, 30, Rio-de-Janeiro, ni ricevis la jenan cirkuleron:

Rio-de-Janeiro, la 5an de Marto 1942. — Estimata Sinjoro,

Antaŭ kelkaj monatoj ni sendis al vi la broŝuron "Esperantismo" kaj en cirkulera letero ni tiam anoncis al vi nian planon de tempo al tempo sendi novan broŝuron aŭ libron al niaj Samideanoj dum la milito, ĉar ili nun ne povas ricevi Esperantaĵojn el Eŭropo aŭ Azio kaj tio multe malhelpas la esperantistan movadon.

La Samideanoj tre entuziasme ricevis nian ideon, tial ni kuraĝas nun sendi al vi du rimarkindajn librojn ĵus aperintajn en Esperanto, nome "La Vidvineto", klasika romano de la brazila literaturo en bona traduko de Prof. Porto Carreiro Neto, kaj "Bhagavad Gîtâ", la mondfama poemo de la sanskrita literaturo, majstre tradukita en versoj similaj al la originalo, de Prof. Francisco Valdomiro Lorenz.

Ni esperas, ke tiuj du novaj libroj aperantaj dum monstra milito, estos agrablaj al vi kaj fariĝos en viaj manoj bonega argumento pri la disvastigado de Esperanto kaj ĝia uzado kiel kulturlingvo.

La prezo de ĉiu volumo en Brazilo estas 5\$ kaj en aliaj amerikaj landoj 5 respondkuponoj, rekomendo kaj afranko 1\$ do ambaŭ volumoj sumas 11\$ aŭ respondkuponojn.

Mondsendo en Brazilo povas esti per poŝtmarkoj ne pli altaj ol 1\$ ĉiu, sed el aliaj landoj ni ne povas ricevi poŝtmandaton aŭ bankĉekon.

Esperante, ke vi bonvolos aprobi nian decidon, ni sincere antaŭdankas vin kaj restas,

Altestime viaj

Livraria da Federação E. Brasileira
La Administranto.

Guia de Conversação Português Esperanto

e

Correspondência Comercial

Compilado por Ismael Gomes Braga

Editado pela LIVRARIA EDITORA DA FEDERAÇÃO E. BRASILEIRA — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro. — Preço: 4\$000.

Livro indispensavel a todo esperantista que deseja aperfeiçoar-se na conversação e correspondência com samideanos estrangeiros.

LA PROBLEMO PRI LA 35 KAMELOJ

Malmultajn horojn post nia ekveturo okazis al ni registinda aventuro, ĉe kiu nia kunvojaĝanto Beremis, talentega, elmontris sian lertecon de kompetenta algebristo.

Ni trovis, proksime de antikva du onforlasita karavansarao (1) tri virojn, kiuj ekscitite diskutadis apud aro da kameloj.

Meze de blasfemoj kaj insultegoj ili, demonatakitaĵoj kaj furiozaj, kriadis:

- Ne povas esti!
- Tio estas ŝtelo!
- Mi ne akceptas!

La inteligenta Beremis serĉis informi pri tio, kion ili diskutadis.

— Ni estas fratoj — klarigis la plej maljuna — kaj ricevis, kiel heredaĵon, tiujn 35 kamelojn. Laŭ la formala volo de mia patro, mi devis ricevi la duonon da ili, mia frato Hamed Namir, la trionon kaj Harim, la plej juna, la naŭonan parton. Sed mi ne scias, kiamaniere ni povos tiel dividi 35 kamelojn, kaj al ĉiu partigo proponita de unu sekvas rifuzo de la aliaj, ĉar la duono de 35 estas 17 kaj duono! Kiel fari la dividon, se la triona kaj la naŭona partoj de 35 ankaŭ ne estas ekzataj?

Tio estas tre simpla — interrompis la "Kalkulanta Viro". — Mi prenos sur min la taskon justece fari tiun partigon, se vi permesos, ke mi almetu al tiuj hereditaj kameloj tiun ĉi belan beston, kiu, ĝustatempe, alvenigis nin al tie ĉi!

Tiam mi tuj intervenis la aferon;

— Mi ne povas permesi tian frenezajn! Kiel ni povus fini la vojaĝon, se tiu kamelo estus senigita de ni?

Ne priokupiĝu pri la rezultato, ho bagdaano! — duonvoĉe aldiris Beremis — Mi tre bone scias, kion mi faras. Cedu al mi vian kamelon kaj fine vi vidos, al kia konkludo mi deziras alveni.

Tiel sekurtone li parolis, ke mi ne dubis cedi al li mian belan kamelon, kiu estas tuj kunigita kun la 35 tie starantaj, por esti partigotaj al la tri heredintoj.

— Miaj amikoj, li diris sin turnante al la tri fratoj — mi tuj faros justecan kaj ekzaktan partigon de la kameloj, kiuj estas nun, kiel vi vidas, 36.

Kaj, sin direktante al la plej maljuna el la fratoj, tiel li parolis:

— Vi devus ricevi, mia amiko, la duonon de 35, tio estas, 17 kaj duonon. Tamen, vi ricevos la duonon de 36, kiu

(1) *Karavansarao*, konstruaĵo speciale farita por senpaga pasloĝejo de la karavanoj.

estas 18. Nenion do vi povos postuli, ĉar estas klare, ke vi profitis el tiu divido!

Kaj, sin turnante al la dua heredinto, li daŭrigis:

— Kaj vi, Hamed Namir, devus ricevi la trionon de 35, tio estas, 11 kaj iom pli. Tamen vi ricevos la trionon de 36, tio estas 12. Vi ne povos protesti, ĉar ankaŭ vi ricevis videblan profiton el tiu negoco.

Kaj fine li diris al la plej juna:

— Kaj vi, juna Harim Namir, laŭ la volo de via patro, devus ricevi la naŭonan de 35, tio estas, tri kaj frakcion. Sed vi ricevos la naŭonan parton de 36, tio estas, kvar. Via profito same estis notinda. Vi nur devas danki nin pro la rezultato!

— Pro la profita divido farita inter la fratoj Namir — divido, per kiu vi ĉiuj profitis — la unua ricevis 18 kamelojn, la dua, 12 kaj la tria, kvar, kaj tio sumiĝas 34 kamelojn (18 + 12 + 4). El la 36 kameloj restas du. Unu el ili apartenas, kiel vi scias, al la bagdaano, mia amiko kaj kunvojaĝanto, la alia rajte apartenas al mi, pro tio ke mi, kontentige de ĉiuj, solvis la komplikitan problemon pri la heredo!

— Vi estas inteligenta, ho fremdulo! — ekkriis la plej maljuna el la tri fratoj. — Ni akceptas vian partigon kun la certeco, ke vi egaljustece ĝin faris!

Kaj la ruza Beremis — la "Kalkulanta Viro" — tuj ekposedis unu el la plej belaj kameloj tie kunvenintaj kaj, transdonante al mi per la bridoj mian kamelon, diris al mi:

— Vi povos nun, mia amiko, daŭrigi la vojaĝon sur via malsovaĝa kaj sekura kamelo! Mi jam havas alian, speciale por mi!

Kaj ni daŭrigis nian vojaĝon al Bagdado.

(El la libro "La kalkulanta Viro", verkita de MALBA TAHAN)

ESPERANTISTA GAZETARO

Malgraŭ la terura milito ni ricevis dum la lastaj monatoj, tamen kelkajn kun mankantaj numeroj, la jenajn eksterlandajn gazetojn kaj revuojn:

"Esperanto Internacia". Heronsgate Rickmansworth, Anglujo; "Amerika Esperantisto". Vaŝington, Usono; "Argentina Esperantisto", Buenos Aires, Argentino; "The British Esperantist". Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo; "Bulteno de I. E. L.". Tagelbacken, Svedujo; "Esperanto". Genève, Svisujo; "Svenska Esperanto-Tidningen-La Espero, Stockholm, Svedujo; "Official Bulletin of The New Zealand", Wellington, Novzelando; "La Eta-Heroldo". Willoughley, Aŭstralio; "Estu Preta". Illinois, Usono; "Fratego", Sevlievo, Bulgarujo; "Nia Parolilo". Goteborg, Svedujo; "Svisa Espero", Zurick, Svisujo; "Novaj Paĝoj", Córdoba, Buenos Aires, Argentino.

INTERNACIA ESPERANTO—LIGO

NOVAJ DELEGITOJ

S. LUIZ (Maranhão) — D. D-ro Francisco de Sales Montelo. Rua Almir Nina, n. 499.

NATAL (Rio-Grande-do-Norte) — D. S-ro Arlindo Castor de Lima. Rua Presidente Passos, 566.

FG. (Komercaĵ Aferoj) S-ro Moacir S. Cunha. Rua Vigário Bartolomeu, 587.

QUARAI (Rio-Grande-do-Sul) — D. S-ro João Sabino Bueno. Rua Duque de Caxias, 627.

SANTOS (S. Paulo). FD. (Koperativismo, Esperanto-propagando, Esoterismo) S-ro Lauro J. Costa. Av. Dr. Moura Ribeiro, 47.

INTERŜANĜO DE POŝTMARKOJ

Por pruvi al ne-esperantistoj, ke Esperanto eĉ dum tre mizera epoko taŭgas kiel interpopola helplingvo, Koperativa Esperantoklubo de Stokholmo starigis centron por interŝanĝo de poŝtmarkoj.

Multaj svedaj filatelistoj deziras korespondi kun alilandaj kolektantoj. Ni helpas ilin laŭ jena principo: La centro tradukas la svede skribitan leteron al Esperanto — forsendas ĝin al nesveda filatelisto. Tiu respondas per esperanto-letero — la centro tradukas ĝin al la svedo, kiu skribis la unuan leteron. Tiamaniere ni servas al la filatelistoj kaj — kio estas plej grave — al la esperantomovado, ĉar kompreneble la korespondanto deziras plej baldaŭ akiri eblecon por mem legi la esperante skribitajn leterojn. Li fariĝos esperantisto.

Por realigi la planojn necesas helpo de ne-svedaj poŝtmark-kodektantoj esperantistoj por kiuj eblas interŝanĝi poŝtmarkojn kun svedoj.

Do, se vi volas kaj povas interŝanĝi, skribu al ni! Kunsendu viajn manko-listojn de svedaj kaj aliaj eŭropaj markoj: Diru ĉu vi deziras korespondi kun gejunuloj aŭ kun lertaj filatelistoj; diru pri kio vi cetere interesiĝas!

Kun esperantista saluto tutkora.

La Koperativa Esperanto-Klubo de Stokholmo.

Poŝtkesto: 4042

Helmer Allén

Stokholmo

Secretario

Suède

Editada pela LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA e impresso nas oficinas dos Irmãos Pongetti, acaba de aparecer a tradução em Esperanto, feita pelo Dr. Luiz C. Porto Carreiro Neto, membro da Comissão Linguística Internacional e ex-secretário geral da mesma Liga, do conhecido romance de Jose de Alencar "A Viúva".

Preço: 5\$000.

BRAZILA KRONIKO

CEARÁ. — De longe ni ne ricevas informojn pri la agado de la grupoj fonditaj dum la jaro 1940 en la urboj Baturité kaj Pereiro.

RIO-GRANDE-DO-NORTE. — *Natal.* La "Rádio Educadora de Natal", laŭ la frekvenco de 1 270, disradias ĉiusabate, de la 16,15a horo, poresperantan horkvaronon. Tion ni ŝuldas al la agemo de la estraro de "Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte" kaj bonvolo de ties honora membro d-ro Luiz da Câmara Cascudo, arta direktoro de tiu radistacio.

Dum la ordinara kunsido de la Esperantistina Grupo "Lidja Zamenhof" oni elektis la jenan estraron: Prez. — f-ino Crimehilda dos Santos, unua sek. — f-ino Eunice de Sá Bezerra, dua sek. — f-ino Luzinete de Oliveira Silva, kas. — f-ino Noeme Morais de Araujo, orat. — f-ino Maria de Lourdes Leite, bibliot. — f-ino Janete Farias de Araujo.

La grupo ankoraŭ ne aliĝis al niaj Ligoj.

"A Voz da Caserna" publikigis du artikolojn por Esperanto, verkitajn de s-ro Moacir S. Cunha, kies titoloj estas la jenaj: "Tutamerikanismo kaj Esperanto" kaj "La Unua Esperantista Grupo en Rio-Grande-do-Norte", kiu parolas pri la "Mossoró Esperanto-Klubo", fondita la unuan de Majo de 1921 de nia delegito en Mossoró, s-ro Targino Soares, malnova kaj fervora esperantisto. Tiu klubo malaperis post vigla laboro dum kelkaj jaroj.

PERNAMBUCO. — *Recife.* Jus alvenis al niaj manoj la Nov-December numero de la bulteno "Pernambuco Esperantista", oficiala organo de "Pernambuka Esperanto-Asocio", kies direktorino estas la senlaca F-ino Artemisa de Araujo. Ĝi enhavas interesajn artikolojn, kies titoloj estas: "Primeira exposição nordestina de Esperanto", de F-ino Maria do Socorro Monteiro, prez. de la grupo esperantista de Garanhuns; "Debate desconhecido", de Ismael Braga; "Natal", de S-ino Leonora Stirling Armstrong; "Ligeiras Impressões sobre a Exposição Esperantista de Caruarú", lecionon de la gramatiko de Esperanto, poeziojn kaj diversajn notojn pri Esperanto-movado. La bulteno, kiu enhavas ses paĝojn en bona papero, publikigas ankaŭ kliŝon pri la inaŭguro de tiu ekspozicio.

Garanhuns. La estraro de "Grupo Esperantista Ismael Gomes Braga" sciigas, ke, pro pravaj motivoj, ĝi prokrastis la inaŭguron de la anoncita

ekspozicio de esperantaĵoj, kiu certe havos grandan sukceson.

Catende. — Translokiĝis al Recife, kie li daŭrigas siajn studojn, la entuziasma junulo Ubiraci Silva Barbosa, fondinto kaj prez. de "Esperantista Grupo Tobias Rabelo Leite". Ni esperas, ke tiu fakto ne okazigos la morton de tiu grupo.

Caruarú. — La estraro de "Grupo Esperantista Couto Fernandes", kiun prezidas s-ro Evandro de Vasconcelos, ricevis diversajn leterojn kun gratuloj kaj impresoj pri la sukcesplena ekspozicio tie okazinta. El la impresoj aperintaj en "Pernambuco Esperantista" ni reliefigas tiun de s-ro Djalma Tavares, urbestro de Alagôa de Baixo, kiu diris, ke "Esperanto estas la sola rimedo por starigi la plenan interproksimiĝon de la popoloj".

STATO RIO. — *Campos.* De pli ol unu jaro ni ne ricevas informojn pri la aktiveco de la grupoj fonditaj en 1940, nome: Societo Esperanta "Lumo kaj Konkordo" kaj Grupo Esperantista "Tria Milo".

SÃO PAULO. — *Santos.* Pagis siajn nunjarajn kotizojn la jenaj anoj de "Centro Esperantista de Santos": S-roj Lauro Jorge de Oliveira, Manoel Pontes Filho, Pascoal Heumann, Francisco Correia de Melo, Vital B. Schmidt. Loka gazeto aperigis laŭdan recenzon pri "La Vidvineto".

RIO-GRANDE-DO-SUL. — *Urbeto S. Sebastião.* Jen estas la nomoj de la anoj de la "Esperanto-Rondeto de S. Sebastião", kiuj aliĝis al niaj Ligoj: S-roj João C. Severo, prez., Carlos Silva Pereira, Policarpo Severo, Edú Severo kaj Paulo Guilherme Correia.

D. Pedrito. La gazeto "Ponche Verde" aperigis artikolon por Esperanto kaj la tradukon de Prof. Mello Souza de la poezio de Zamenhof "La Espero".

S. Gabriel. La gazeto "O Imparcial" malfermis kolonon titolitan "Tra la Mondo Esperantista". Jam aperis artikoloj de s-roj João Guilherme kaj Paulo Guilherme.

MINAS GERAIS. — *Belo Horizonte.* Aliĝis al niaj Ligoj la jenaj anoj de Grupo Esperantista "Humberto de Campos": S-roj ing. José Dias Vieira, nuna prez., Adolfo Aleixo Martins, Geraldo Angelo Pereira, Mister Black Moreira kaj Candido Ubaldo Gonzalez. Tial la grupo havas 10 kvitajn anojn aliĝintajn.

Je la lasta semajno de la nunjara monato Julio okazos la *Tria Nacia Kunveno de Inĝenieroj*. Ni rememori-

gas, ke la Dua Kunveno, efektiviginta en S. Paulo, aprobis rezolucion, kiun raportis D-ro Aristoteles J. de Faria Alvim, prez. de "Montara Esperanto-Klubo", pri la organizo de fiksa teknika terminaro en portugala lingvo kun traduko en kvin lingvoj kaj en Esperanto.

Perdões. Aliĝis al niaj Ligoj kiel membro-abonanto (MA) s-ro Manoel Domingues de Sá Fortes, farmaciisto.

Carangola. En "Gazeta de Carangola" aperis artikolo por Esperanto de d-ro Kruger Matos. La du grupoj esperantistaj fonditaj en 1940 ne sendis informojn pri sia propaganda agado.

RIO-DE-JANEIRO. — Aro da entuziasmaj esperantistoj fondis grupeton kun sidejo sur la strato Barão de Ubá, 170, teretaĝo, kie funkcias la "Grêmio do Instituto Beiriz". La nova grupo estas nomata "Sociedade Esperantista Frateco", kies estraro, konsistanta el S-roj Diderot Freitas — prez. kaj Alemar Bourguignon Beiriz — sek., jam vizitis la sidejon de BLE. S-ro Freitas, kiu jam ricevis la *Ateston pri Lernado* kaj nun estas lernanto de la Perfektiĝa Kurso de BLE, malfermis elementan kurson, kiu funkcias ĉiujauĝe, de la 20a ĝis la 21a horo. Al la nova grupo niajn gratulojn kaj dezirojn pri longa kaj fruktodona vivo.

Je la 30a de Marto fondiĝis alia grupo esperantista, kiu ricevis la nomon "Associação Esperantista do Meyer", pri kiu ni datale parolas aliloke.

La 16an de Majo okazis la festo dediĉita al S-ro Osvaldo Diniz Magalhães, pro la datreveno de la inaŭguro de l' gimnastika kurso disradiata ĉiutage de la stacio de "Rádio Nacional" dum la nomata "Horo de Gimnastiko". La prez. de BLE sendis gratulan telegramon al s-ro Diniz Magalhães.

La Grupo Esperantista "Bezerra de Menezes", je la dek-unua de Aprilo, festis la duan datrevenon de sia fondo per kunveno, kiun prezidis s-ro João Pedro de Espírito Santo. Parolis s-ro Otacílio Lopes kaj faris la biografion de Zamenhof s-ro Délio Pereira de Souza. S-ino Arlette de Souza deklamis poezion kaj la reprezentanto de la ĵurnalo "Vanguarda" salutis la esperantistan movadon.

Aliĝis al niaj Ligoj kiel membro-subtenanto (MS) s-ro Manoel Jorge Gaio, komercisto.

Ni ricevis la du jenajn broŝurojn eldonitajn de la "Livreria Editora da Federação E. Brasileira": "O Espe-

ranto para os espíritas". Sugestioj prezentitaj al la Unua Tutamerika Spiritisma Kongreso de Ismael Gomes Braga, kaj "Radio kaj Esperanto". Du novaj fortoj por servi al Spiritismo. Sugestio prezentita de la Societo "Horo Espírita Radiofônica", kiu aperis la unuan de Junio 1939a kaj estas disradiata ĉiuvendrede. Hordekuono estas dediĉata al Esperanto.

"Gazeta de Notícias" publikigis trikolonan artikolon titolitan "La viro, kiu elpensis idiomon", kun fotografado de Zamenhof kaj bildo montranta diversajn librojn en Esperanto.

Ni legis en la revuo "Visão Brasileira" (Brazila Vizio), ke, dum la Unua Kongreso de Brazileco s-ro Cícero Bernardino dos Santos proponis, ke "la Kongreso ekzameni la oportunecon anstataŭigi la instruadon de fremdaj lingvoj ĉe la brazilaj lernejoj".

La "Revista de Educação contra incêndios" publikigis en sia aprila numero informojn celantajn la personojn, kiuj, ne povante ĉeesti kursojn, tamen deziras hejme lerni Esperanton. Ĝi sia maja numero ĝi aperigis fotografadon de aninoj de Grupo Esperantista "Lidja Zamenhof", kopion de la poŝtkarto enhavanta la gramatikon de Esperanto kaj artikolon titolitan "Português, inglês e espanhol". La direktoro de tiu revuo estas s-ro Olavo C. Guimarães.

"Reformador" publikigas en ĉiuj numeroj artikolojn por Esperanto kaj informojn pri la esperanta movado. Ni citas la jenajn artikolojn: Venko de Esperanto, "Pri la tutamerika kunfrateco", "La Vidvineto", "Bhavagad-Gitâ en Esperanto" kaj aliaj.

"Revista Espírita do Brasil" publikigis artikolon de Cristiano Agarido titolitan "Respektinda voĉo".

K O R E S P O N D A D O

Volas korespondi kaj interŝanĝi fotojn kun Sud-Amerikaj knaboj ĉirkaŭ 17-jaraj, *Jack Domas*, 414 Wisconsin Ave., Oak Park, Ill., (U. S. A.).

S-rino *Virginia Suarez*, 811 Holdridge Ave., Elmira, N. Y., (U.S.A.), dommastrino 38-jara, deziras korespondi kun virinoj edzinigintaj en Sud-Ameriko.

Esperanto-Klubo de Los Angeles — diversaj gesamideanoj deziras korespondi kun Sud-Amerikaj gesamideanoj. Skribu al la prezidanto de la klubo, *Joseph R. Scherer*, 3222 Larissa Drive, Los Angeles, Calif., (U.S.A.)

S-ro *L. J. McCaulley*, instruisto, deziras filatelan korespondadon kaj interŝanĝon de ĉiulandaj poŝtmarkoj (ne grandkvante) kun serioza brazila filatelisto. Adreso, 4937 Penn St., Philadelphia, Pa., (U. S. A.).

S-ro *Pete Weil*, 2120 W. 8 St., Cincinnati, Ohio, (U. S. A.), deziras korespondadon kun gejunuloj; (ankaŭ sendos sian foton al reciprokantoj.)

S-ro *Heraldo V. Botta*, Str. Sgo. del Estero, 3008. *Santa Fé*. Argentina, deziras interŝanĝi poŝtkartojn.

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — RIO-DE-JANEIRO

QUOTA ANUAL

1942

Categoria

AM (membro simples)	15\$000
MJ (recebe o "Jarlibro" — Anuário)	25\$000
MA (recebe o "Jarlibro" e a gazeta "Esperanto Internacia")	50\$000
MS (sócio cooperador, recebe o "Jarlibro" e a gazeta "Esperanto Internacia")	120\$000

Todos recebem gratuitamente "O Brasil Esperantista".

Todo sócio da Liga é também sócio da "Liga Esperantista Internacional" com séde em Londres.

Revista da Sociedade de Geografia do Rio de Janeiro

(Revuo de la Societo de Geografio de Rio de Janeiro)

Jam aperis la XLVIII volumo de tiu grava revuo de la Societo de Geografio de Rio de Janeiro, kiu de longe cedis al Brazila Ligo Esperantista kaj al Brazila Klubo "Esperanto" komfortan ĉambron por iliaj sidejoj.

Tiu volumo enhavas 18 artikolojn kun resumoj en Esperanto. La unua artikolo estas la transskribo de la parolado farita de Admiralo Raul Tavares, prezidanto de la Societo, okaze de la solena kunsido de la Societo memoriga de la 58a datreveno de ĝia fondo.

Sur la kovrilo de tiu volumo oni legas la jenan frazon: "Resumo en Esperanto de ĉiuj artikoloj".

O RÁDIO em 16 palestras

(E. Aisberg)

Traduzido do Esperanto por A. COUTO FERNANDES

E

CARLOS DOMINGUES

3.^a EDIÇÃO EM PORTUGUÊS

Preço 15\$000

Editores — **Irmãos Pongetti**

Encomendas à Liga Esperantista Brasileira

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

PODEM SER ADQUIRIDOS NA

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166
Livraria Rio Branco, à Rua S. José, 42.

Livraria da Federação E. Brasileira —
Avenida Passos, 30.

PEÇAM CATÁLOGO

SPECIALA PREZO POR LA GRUPOJ

FILIITAJ AL B. L. E.

10 Kolektoj (Gramática elemental de Esperanto, Vocabulário Esperanto-Português, Exercícios).

50\$000

Nur du lingvojn lernu tuj,
Kaj ne pensu pri la tria:
Estu unu de l' Patruj',
De l' homar' estu l' alia!

I. G. B.

"BRAZILA LIGO ESPERANTISTA" DONACIS AL ĈIU MEMBRO PAGINTA SIAN NUNJARAN KOTIZON KAJ DONACOS AL ĈIU, KIU ĜIN PAGOS ĜIS LA FINO DE LA MONATO SEPTEMBRO, AŬ ĈIU NOVA ALIĜINTO, EKZEMPLERON DE LA ROMANO "A VIUVINHA", DE JOSÉ DE ALENCAR, MAJSTRE TRADUKITA ESPERANTEN DE D-RO LUIZ PORTO CARREIRO NETO.